

Esperanto tra la Mondo



Ankoraŭ aliaj esperantaj manifestacioj en 1966 :

— Internaciaj Feriaj Esperantaj kursoj, en Helsingör (Danlando), 17-24a de julio. Adreso : L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj (Danlando).

— 14a Internacia Esperanto-Feria Semajno, en Krommenie (Nederlando), 14-22a de aŭgusto, gastigado ĉe esperantistoj. Adreso : S-ino J.A. v.d. Meulen-v. Herten, Popelstr. 13, Krommenie.

— Internacia Junulara Kunveno, en Bamberg (Germanujo), 28a de majo-4a de junio. Temo : « Minoritataj popoloj ». Adreso : 44a Germana Esperanto-Kongreso, 86 Bamberg, Untere Sandstr. 4.

— 19a Kristana Konferenco, en Debrecen (Hungario), 23-29-a de julio. Temo : « Por la unueco de la Homaro ». Adreso : Fino T. Putto, Schaapsweg 139, Ede (Gld), Nederlando.

— Internacia Esperanto-Somerumejo, en Primošten, ĉe Adriatika Maro (Jugoslavio). Restadoj dum la tuta somero. Adreso : Internacia Esperanto-Somerumejo, Primošten, kod. Šibenika, Jugoslavio.

— Internacia Montara Esperanto-Somerumejo, Divljana, Bela Palanka, Jugoslavio. Restadoj dum la somero.

Eldonaĵoj :

— **Teo Jung : La Esperanta Konjugacio.** Unua parto. Dua parto aperos en la daŭro de la venonta somero aŭ aŭtuno. Prezo por ambaŭ volumoj kune : 54 steloj (plus 10 % por sendkostoj). Eldonis : Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

— Graĵoj en vento estas 10 jara : Per « Graĵoj en vento » 50 klasoj el 22 landoj interŝanĝas gazetojn faritajn de la infanoj mem. Adreso : 66, rue des Pins, 2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

— Ĵus aperis « Elementoj de geologio » en ses lingvoj (el kiuj Esperanto) fare de Sro. Gérard. Eld. SEDES, 5, place de la Sorbonne, Paris-5^e.

— Aperis en Israelo, hebrelingva lernolibro de esperanto de Dro Mašler, kun esperanta-hebrea vortareto.

— En Reĵjaviko, oni eldonis islandan-esperantan vortaron.

— Aperis en Taegu, lernolibro de esperanto, en korea lingvo kaj esperanta-korea vortareto.

— En Hindujo, lernolibro por hindilingvanoj estas preparata de Sro Aŝvinikumar.

Revuoj :

— « Lingvologia revuo », esperantlingva fakeldonaĵo por lingvologio. Adreso : PO Box

764, Ingham, N. Queensland, Aŭstralio.

— « Agrikultura Bulteno ». Redaktejo : ul. Oboriste 15, Pestera, Bulgarie.

— « Paco » monata organo de MEM. En Francio : Sano Blanc, 45 bis, rue Jeanne-d'Arc, Lyon 3.

En la radio...

— Radio-Budapest komencis la lan de februaro, elsendadi ĉiutage en esperanto. Horoj : 20.30-20.45 laŭ mezeŭropa tempo. Ondoj : 240 m 41, 6 m, 48, 1m. Adreso : Radio-Budapest, Budapest VIII, Brody Sandoru. 5-7, Hungario.

Kaj en la televido...

— La 25an de februaro, la franca nacia televido prezentis en la kadro de la emisio pri filatelo, sekvencon pri esperanto kaj pri la esperantaj poŝtmarkoj, kun intervjuo de Sro Jack Rousseau.

El germana demokrata Respubliko :

— Laŭ lastaj informoj, en G.D.R., nuntempe okazas 100 esperanto-kursoj por 1.000 personoj. Tamen, la manko da profesoroj, lernolibroj kaj prononcaj diskoj grave sentiĝas.

Internaciaj renkontoj okazis dum la foiro de Leipzig kaj en julio, okazos renkonto de baltmaraj esperantistoj en Rostock.

El Francujo :

— La Esperanta Grupo de Limoges organizis poresperantajn kampanjojn en 12 urboj kaj urbetoj per prelegoj, ekspozicio kaj prezentado de diapozitivaj. Sukceso en la plej multo el tiuj urboj. La grupestroj dezirus koni la spertojn de gesamideanoj pri tia agado. Skribu al Sro Tremont, rue Turgot, 87 Panagol.

El Belgujo :

— En januaro komenciĝis esperanto kurso por Afrikaj studentoj. Gratulkartoj dezirataj : Foyer Africain, Esperanto kurso, 119, avenue Coŝhen, Bruxelles 18 (Uccle) Belgujo.

Radio-amatoroj :

— Ni memorigas al vi, ke la revuo « Homo kaj Kosmo » entenas en ĉiu numero la informan kronikon de la esperantaj radio-amatoroj.

Hungara alvoko al la sportistoj por enkonduko de esperanto :

— La 30an de januaro, la ĵurnalo de la hungaraj sindikatoj « Nepszava », publikigis alvokon de hungaraj ĉampionoj, sportaj gvidantoj kaj ĵurnalistoj al la olimpiada Komitato kaj la sportistoj de ĉiuj landoj, por enkonduko de la internacia lingvo en la sportaj diverslandaj renkontoj.